

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1986



30. GEFA-Jahresversammlung vom 17. bis 19.10.1986 in Duisburg



**Empfang im Rathaus — Bürgermeister Fuhrmann überreicht ein Geschenk der Stadt
an den GEFA-Vorsitzenden Gießner**

NRZ-Foto: Jürgen de Waal

Digna 30a jarkunveno de GEFA

En la historio de la Germana Esperanta Fervoĵista Asocio (GEFA) la jubilea jarkunveno 1986 okupis elstaran lokon. 127 aliĝintoj, inter ili geamikoj el ok aliaj landoj, ĝuis en Duisburg de la 17a ĝis la 19a de oktobro 1986 multspecan programon.

La gastiganta urbo

Ĉu urbo kun siaj specifaj atributoj konvenas al la deziritaj kondiĉoj por Esperanto-kongreso, povas esti prijuĝata ofte nur postero. Tio validis ankaŭ por GEFA, kies membroj kaj geamikoj volonte estis sekviintaj la inviton por la tiujara kunveno. Evidente oni estis kontenta. La kongresloko Duisburg prezentis sin brile dum tri plej ofte sunoplenaj tagoj. La bone markita akceptejo en la stacidomo rapide provizis la alvenintojn per la necesaj kongrespaperoj inkluzive multkoloran urbprospekton en Esperanto. Bone solvita estis ankaŭ la loĝigo en proksimaj hoteloj. Ideala estis la kongresejo: moderna, facile atingebla konstruaĵo. En la vestiblo lerte aranĝita ekspozicio altiris la atenton de la kongresanoj. Bedaŭrinde mankis preskaŭ tute neesperantistaj vizitantoj, ĉu pro manka publiĝigo, ĉu pro ĝenerala malintereso pri la internacia lingvo? Ankaŭ la reago post la gazetara konferenco ne tute kontentigis. Bonŝance aperis en la gazeto foto pri la akcepto de la delegitoj per urbestro Fuhrmann en la urbdomo (vidu paĝon 1). Dum la sabato riĉe ekipita librostando funkciis en la kongresejo, kie estis havebla ankaŭ kasedoj kaj diskoj. Do la industria grandurbo postlasis bonan impreson.

Celtrafaj ideoj serĉataj

Unuafoje dum jarkunveno oni povis partopreni kolektadon de opinioj kaj proponoj rilate la poresperantan agadon. Kion respondi al la demando, kial oni lernu Esperanton?

Kiel varbi kaj per kiuj rimedoj? Kiaj estas la problemoj en la movado, kaj kiamaniere ili estas solveblaj? Kiel interesigi fervoĵistojn, precipe izolulojn? La vigan diskuton, al kiu kontribuis ankaŭ eksterlandaj gastoj, lerte gvidis Dieter Hartig.

Laborgrupo plue okupiĝos pri la realigo de la kolektitaj ideoj: ili povus doni novajn impulsojn por la agado inter gekolegoj.

Organizaj kaj fervoĵfakaj laboroj

Dum la laborkunsidoj la funkcioj de GEFA okupiĝis sub la gvido de la prezidanto Giessner pri multnombraj aferoj. Ekzemple la telekurso estas teknike plibonigata. Estonte la programitaj leteroj estas presataj en pli facile legebla formo. Projektitaj estas seminarioj por kursgvidantoj. Kiel Gernot Ritterspach anoncis, aperos venontjare parto el la tradukitaj fakterminoj. Krome estas projektite eldoni la esperantigitajn Unuecajn regulojn por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (CIV). Pri la venonta IFEF-kongreso en Pollando (16.–22. 5. 1987) aperos detaloj kaj aliĝilo en BULTENO n-ro 1. La sekva jarkunveno de GEFA okazos en Ingolstadt (9. – 11. 10. 1987). GEFA aranĝos komence de 1988 la internacian skisemajnon. La IFEF-kongreso 1988 okazos en Perpignan (suda Francio) kun sekva postkongreso en Andorra.

Lingvaj ekzamenoj

Post plurjara paŭzo tri kandidatoj aliĝis al la lingvaj ekzamenoj kaj finis ilin sukcese. Temas pri Kurt Berke kaj Hermann Haasjes (ambaŭ kursfina ekzamenoj) kaj Heinz-Gerd Diesenhoff (lingva kapableco). Por 1987 oni atendas volonte novajn kandidatojn.

La solena vespero

Kulmino de tiu jarkunveno sendube estis la tradicia festvespero sabaton. La ĉeestantojn salutis Manfred Retzlaff, komisiito por Esperanto en la direkcia distrikto Essen. Joachim Giessner, multjara GEFA-prezidanto, precipe bonvenigis la honorgastojn. Salutojn transdonis s-ro Siffert por la distrikta socialorganizaĵo kaj s-ro Brückmann por la sindikato de fervoĵaj oficistoj kaj aspirantoj. Otto Rösemann komunikis salutojn nome de la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEF). Por la landaj sekcioj de IFEF transdonis bondezirojn s-ro de Sutter (Belgio), s-ino Mateeva (Bulgario),

s-ro Pištora (Ĉeĥoslovakio),
s-ro Robiille (Francio),
s-ro Karolyi (Hungario),
s-ro Bultman (Nederlando),
s-ino Szmatoch (Pollando),
s-ino Fiechter (Svislando).

La festvesperon kompletigis pluraj muzikaj kontribuajoj de la Orff-muzikgrupo el Duisburg-Bissingheim sub la direkto de s-inoj Heib kaj Jochheim. La talentitaj gejunuloj rikoltis meritan aplaudon pro siaj klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj. Belsonajn ĝuojn prezentis s-ino Kohl (soprano) kaj s-ro Fluck (tenoro). El sia abunda repertuaro ili kantis, parte en dueto, el konataj operetoj. Ambaŭ estas bone konataj kaj ŝatataj en Esperantujo. La GEFA-prezidanto kore dankis al ĉiuj kontribuintoj de la sukcesinta vespero.

Por finance subteni la fervojfakan laboron de IFEF (vidu BULTENO n-ro 4/1986) oni estis aranĝinta tombolon. Sur longa tablo troviĝis multnombraj gajneblaj objektoj, kiuj ĉiuj trovis novajn posedantojn. La rezulto estis 400 germ. markoj. Poste ludis por dancado s-ro Niestegge ĝis longe post noktmezo. La elegantaj roboj de la damoj renkontis admiron kaj allogon.

Ekskurso per ŝipo

Kiel konate Duisburg disponas pri la plej granda internlanda haveno de la mondo. Ne mirinde ke la ekskurso sabaton posttagmeze efektiviĝis per ŝipo. La rondveturado komenciĝis en la interna haveno. La ŝipo veturis tra la ekstera haveno kaj tri kilometrojn sur la rivero Rejno ĝis la enfluejo de la rivero Ruro (Ruhr), tiam tra la havenkanalo ĝis du el 20 havenbazenoj en Ruhrort. Ambaŭflanke estis videblaj maŝinhaloj de mondkonataj entreprenoj, kemiaj fabrikoj, kuprofandoj,

magazenoj, kargejoj, arganoj, kargopontoj, cisternoj, ŝipriparejoj kaj eĉ metalrubaja insulo. Ĉio trovis grandan intereson, se oni ne preferis la restadon en la restoracio pro la malvarmeta vento. Estis agrabla, impresoriĉa posttagmezo.

Matineo kaj adiaŭo

La dimanĉo komenciĝis por interesuloj per katolika diservo en apuda moderna preĝejo. Kantoj kaj tekstoj de la meso en Esperanto estis preparitaj. Poste oni kolektiĝis en aparta salonego de la kongresejo bonege taŭga por la programoj de la matineo. S-ro Nitsche, laŭdire la motoro de la urbaj esperantistoj, montris diapozitivon pri la tiujara kongreso de la Universala Esperanto-Asocio en Ĉinio, precipe pri la homoj tie kaj ilia vivmaniero. La printempan IFEF-kongreson en Skopje (Jugoslavio) ilustris Wilhelm Barnickel per sia sonfilmo. Volonte la partoprenintoj revidis sin sur la ekrano. Tre impresiga estis la sekva teatraĵo verve ludita de ses talentuloj el la Germana Esperanto-Junularo. Prezantata estis la sinteno de juna soldato, kiu tute ne vidas iun motivon militservi, sed preferas la amikecon al malamiko, ĝis kiam bomboj kaj grenadoj detruas la iluzion.

Bulgaran junulo emocie ludis gitaron, antaŭ ol la prezidanto finis la jarkunvenon kun danko al ĉiuj, kiuj preparis kaj sukcesplene organizis ĉion, precipe al la kolego Rolf Terjung. (La kompletan tekston legu aliloke).

Kiu ankoraŭ ne devis rapidi al sia trajno, eksidis kaj tagmanĝis kun la aliaj babilante. Adiaŭ ĝis plej malfrue post unu jaro en Ingolstadt. W.B.

Herbsttreffen in Duisburg

Die 30. Jahresversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk ging am 19. Oktober 1986 in Duisburg nach dreitägiger Dauer zu Ende. Die Jubiläumsveranstaltung, zu der der Bezirk Essen eingeladen hatte, wurde von den Kollegen im Raum Duisburg vorbildlich ausgerichtet. Tagungsstätte war die Mercator-Halle in Bahnhofsnähe. Dort erwarteten die zahlreich angereisten Teilnehmer eine ein-

drucksvolle Ausstellung sowie ein reichhaltiger Bücherstand. Der Einladung waren auch Sprachfreunde aus acht Nachbarländern gefolgt, die ihrerseits dazu beitrugen, neue Ideen zur Information und Werbung für Esperanto in Eisenbahnerkreisen zu finden. In den Arbeitssitzungen befaßten sich Arbeitsausschuß und Beauftragte mit organisatorischen Fragen. Das Angebot zum Ablegen der Sprachprüfung wurde von einigen Kandidaten mit Erfolg wahrgenommen.

Am Festabend konnte Joachim Gießner, langjähriger Vorsitzender der Vereinigung, zahlreiche Gäste begrüßen. Für den Bezirksvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks Essen wünschte Herr Siffert der Veranstaltung einen guten Verlauf. Namens der Gewerkschaft der Bundesbahnbeamten und Anwärter hieß Herr Brückmann die Teilnehmer willkommen. Weitere Grüße entboten Vertreter des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) sowie der Landesverbände in Ungarn, Belgien, Bulgarien, Frankreich, den Niederlanden, Polen, der Tschechoslowakei sowie der Schweiz. Die polnische Kollegin lud besonders zur Teilnahme am IFEF-Kongreß 1987 in Kattowitz ein. Der Festabend wurde musikalisch vom Orff-Spielkreis aus Duisburg-Bissingheim, ferner von Gesangsbeiträgen von Frau Kohl und Herrn Fluck umrahmt. Der Gewinn aus

einer Tombola wird die Arbeit der Fachwörterbuch-Kommission unterstützen. Die Jahresversammlung bot den Teilnehmern Gelegenheit zu einer Schiffsfahrt durch die weitläufigen Anlagen des Binnenhafens. Bei der sonntäglichen Matinee wurden Dias über China gezeigt, wo erstmals in diesem Jahr der Esperanto-Weltkongreß stattgefunden hatte. Ein Tonfilm weckte Erinnerungen an den letzten IFEF-Kongreß in Jugoslawien. Die deutsche Esperanto-Jugend führte ein eindrucksvolles, gegen den Kriegsdienst gerichtetes Theaterstück vor. Zum Schluß dankte der Vorsitzende herzlich allen, die zum Gelingen der Veranstaltung beigetragen hatten, und lud zum Herbsttreffen 9. – 11. 10. 1987 nach Ingolstadt ein.

Die Jahresversammlung wurde in der Presse freundlich erwähnt. W.B.

Ansprache des GEFA-Präsidenten Gießner zum Festabend am 18. 10. 1986 in Duisburg

Jubiläen sollten gefeiert oder zumindest ins Bewußtsein gerufen werden. Heute Abend haben wir Grund dazu. Das Jubiläum, um das es sich handelt, ist die Tatsache, daß wir heute hier die 30. Jahresversammlung unserer Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten veranstalten, und zwar in 30 aufeinanderfolgenden Jahren. Das ist nicht unbedingt selbstverständlich, denn jede solche Jahresversammlung erfordert außer Geld eine gehörige Portion Opferbereitschaft einiger Leute, die genügend Zeit und Hingabe und oft sogar eigene Mittel aufbringen müssen, um eine solche Veranstaltung auf die Beine zu bringen. Bisher haben wir noch immer unter unseren Mitgliedern Bereitwillige gefunden, die diese Aufgabe auf sich genommen haben. Und wir haben in diesen 30 Jahren auch die Erfahrung gemacht, daß uns die Stellen des Bundesbahnsozialwerks, der Hauptvorstand in Frankfurt, und die Bezirksvorstände ihre Unterstützung und Förderung nie versagt haben. Praktische und moralische Unterstützung. Allen diesen Stellen des BSW, und allen unseren Sprachfreunden – auch denen, die schon nicht mehr unter uns weilen – die irgendwann bis zum heutigen Tage mitgeholfen haben, daß wir immer wieder zusammenkommen konnten, sei hiermit ein herzliches Dankeschön gesagt.

Mehr als dieses Dankeschön können wir nicht geben. Jeder, der mitgeholfen hat und immer wieder mitmacht, findet wohl den schönsten Dank darin, daß diese Jahresversammlungen nun seit 30 Jahren ihren Zweck erfüllen, nämlich Rechenschaft zu geben über unsere Tätigkeit als Eisenbahner-Esperantisten und Möglichkeiten zu suchen, wie wir die sprachlich revolutionären Ideen von Dr. Zamenhof, dem Schöpfer der Sprache, in die Tat umsetzen und voranbringen können, und das vor allem natürlich im Bereich der Eisenbahn und Eisenbahner. Und ich meine, daß wir im Laufe der Jahre und im Hinblick auf die sehr beschränkten Mittel, die uns von jeher zur Verfügung stehen, doch eine ganze Menge erreicht haben. Wer sich darüber informieren will, möge bitte die Sondernummer unseres Mitteilungsblattes „BULTENO“ vom Herbst 1985 studieren, in der alles Wesentliche aus der Geschichte der Eisenbahner-Esperantisten dargestellt ist.

Daß wir mit dem Erreichten nicht zufrieden sind, dürfte verständlich sein, denn vom Ziel sind wir noch weit entfernt. Und auch wir Esperantisten bleiben nicht von den Auswirkungen der modernen Zeit verschont und auch nicht von der Entwicklung bei der Deutschen Bundesbahn. Allgemeiner Materialismus, Fernsehen, Computer, Rationalisierung sind nur einige Erscheinungen, die uns, wie vielen anderen

Verbänden, das Leben schwer machen. Esperanto ist wahrlich sehr, sehr einfach zu erlernen im Vergleich zu anderen Sprachen. Aber selbst diese geringfügige Mühe auf sich zu nehmen scheuen die meisten Menschen – und leider besonders Jugendliche. Und es ist nun mal so, daß eine Sprache erst dann zur Sprache wird, wenn man sich ihrer zu bedienen vermag.

So können wir am heutigen Tage dieses Jubiläums uns nur selbst wünschen, daß wir unseren Weg trotz aller Schwierigkei-

ten folgerichtig weitergehen, besonders jetzt, da wir im nächsten Jahr auf ein ganz großes Jubiläum zusteuern, nämlich auf das hundertjährige Bestehen der Internationalen Sprache Esperanto. Diese Tatsache soll uns ganz besondere Verpflichtung sein und bleiben. In diesem Sinne wünsche ich als langjähriger Vorsitzender der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten, dem diese Tätigkeit ans Herz gewachsen ist, daß der heutigen 30. Jahresversammlung noch viele, viele weitere folgen mögen.

Parolado de GEFA-prezidanto Giessner en la matineo Duisburg 19. 10. 1986

Fariĝis kutimo, ke en la matineo de la jarkunvenoj – anstataŭ legi la jarraporton, kiun vi ja trovos en la BULTENO – mi desegnas bildon de la situacio kiel eble plej koncizan. Pro tio estas konsilinde, legi en BULTENO ne nur la jarraporton, sed ankaŭ tion, kion mi tie ĉi diras.

Hieraŭ vespere en la festa kunveno mi parolis pri la ĝojiga fakto, ke ni kapablis okazigi 30 jarkunvenojn en 30 sinsekvaj jaroj. Decas aldoni vorton pri la esenco de niaj germanaj jarkunvenoj. Pro tio, ke ĉiam la kompetenta BSW-distriktestraro kaj ankaŭ la BSW-ĉefestraro ekonomie subtenis niajn kunvenojn, ni jam de jardekoj povis aranĝi allogajn programojn, povis lui prestiĝajn salonojn kaj ne bezonis postuli de niaj partoprenantoj altajn kotizojn. Tial la nivelo de niaj jarkunvenoj laŭ ekstera aspekto kaj programenhavo ĉiam estis relative alta. Tio certe esprimiĝis ankaŭ en la fakto, ke eksterlandaj gastoj volonte venis al niaj kunvenoj, pri kio ni ĝojegas.

Kiel vi scias, ni ĉiam klopodis, oferti al niaj membroj kaj gastoj ion, kion ili ankaŭ poste volonte memoris kio ankaŭ iom helpis ilin en ilia ofte malfacila vojo en Esperanto-medio. Ni ja ne nur volis kaj volas kunesti en amika rondo, sed ankaŭ prezentii ion el la internaj fortoj, kiuj vivas en la lingvo, en ĉio, kio estas ligita al ĝi. La laborkunsidoj donu al la funkciuloj eblecojn kontribui per siaj kapabloj al la komuna afero, sed ankaŭ kunporti impulsojn por sia hejma agado. La kultura programo montru la eminentajn energiojn kaŝitajn en la Inter-

nacia Lingvo kaj donu al ĉiu ĉeestanto la certecon, ke tiu lingvo estas la lingvo de la estonteco, eĉ se ofte la realeco ne tiel aspektas.

Tamen mi ne deziras vekti la impreson, kvazaŭ sufiĉas viziti jarkunvenon, kaj poste ĉio el si mem okazos. Mi ŝatas diri: male! Jarkunvenoj nur povas doni instigojn, sugestojn, proponojn. Ĉio posta dependas de persona iniciatemo, sen kiu nenio funkcias. Ke ni hodiaŭ festas nian jarkunvenon, ni ŝuldas kaj dankas al tiuj homoj, kiuj de 76 jaroj kontraŭ ĉiuj obstakloj defendis nian fervojistan movadon. Malfacilaĵoj, komplikaĵoj, malamika sintenado, malicaĵoj, ĉio tio jam ĉiam ekzistis. Novaj tamen estas la akompanaj fenomenoj de la nuntempo, precipe de la lasta kvarona jarcento.

Nia lingvo estis kreita en esence alia tempo, sub komplete aliaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj.

Al ni nuntempuloj restas nenio alia ol vole-nevole agnoski la nunan ĝeneralan situacion kaj adaptiĝi al ĝi, al la manipulado de la amasoj, la diktaturo de la komputero, la ŝajna regado de la angla lingvo, al la konsekvencoj el la rilatoj inter la du grandaj potenc-blokoj, la ekzistado de la Tria Mondo ktp, ktp. Ĉio tio influas ankaŭ nian lingvon kaj sekve nian agadmanieron. Tro multnombraj kaj seriozaj, ofte minace serioza, estas la problemoj de la homaro, ol ke oni rajtus esperi, ke la problemaro de komuna neŭtrala lingvo momente povus okupi superan rangon. Sed ĝi ankaŭ ne estu ŝovata ien ajn. Zorgi, ke tio ne okazu, estas nia tasko, afero de la tuta esperantistaro, el kiu

ni fervojistoj estas nura parto. Tiu tasko estas giganta, same giganta kiel tiu, antaŭ kiu staris la unuaj esperantistoj antaŭ preskaŭ cent jaroj. La diferenco tamen estas, ke la tiama mondo estis pli preta akcepti tian fenomenon, kiel estas internacia lingvo, ol la hodiaŭa kun siaj ĉion regantaj amaskomunikiloj.

Mi diris, ke niaj jarkunvenoj donas instigojn kaj forton. Kie ni pli adekvate povus ĉerpi tiajn fortojn ol ĉe la kreinto de nia lingvo, ĉe d-ro Zamenhof? Ĉe

tiu homo, kiu fakte sian tutan vivon subordigis al sia lingva ideo, al tiu ideo, kiu nun vivas cent jarojn. Sur la sojlo de tiu nova venonta jarcento mi memorigas, kiel jam en Skopje, la tri vortojn de Zamenhof en lia poemo „La vojo“, la vortojn „esperanto, obstino, pacienco“. Ilin ni kunportu hejmen el Duisburg, ilin ni martelu en niajn cerbojn, ili helpu nin, kiam ni estas malkuraĝaj, seniluzigitaj, ili gvidu nin ĉiam en la ĝustan direkton. Ĉar ni kunrespondecas por la plua prospero de nia lingvo Esperanto!

Jarraporto pri la periodo de la 29a ĝis 30a jarkunvenoj (1985/86)

Enkonduko

Post la pasintjara jubileo — 75 jarojn GEFA — ni povas festi ĉi-jare alian datrevenon, nome la 30an jarkunvenon. Ankaŭ tio estas io menciinda, ĉar atestas, ke ekde 1957, kiam ekestis la ideo por aranĝi jarkunvenojn, GEFA kapablis regule okazigi sian ĉiujaran renkontiĝon. Tio tute ne estas memkomprenebla en mondo, kiu alte taksas la materian substancon de tiu tero. La gekolegoj, kiuj dum tri jardekoj kontribuis iamaniere al tiuj ĉiujaraj kunvenoj, povas esti fieraj kaj kontentaj, ĉar ili kunlaboris ne nur en la praktika aranĝado, sed ili samtempe zorgis, ke multaj homoj — nia membraro kaj gastoj — trovis ĉiujare allogan eblecon travivi agrablajn horojn inter amikoj. Sed ankaŭ internajn forton oni certe povas kunporti el tiuj jarkunvenoj. Nia deziro en tiu trideka jubileo estas, ke niaj jarkunvenoj daŭre okazu en sama kvalito kaj etoso, kio ne ĉiam estos facila pro la konataj cirkonstancoj, inter ili la ĉiujara rikolto de la morto.

En la pasinta periodo ni eksciis pri jenaj membroj, kiuj nin forlasis:

| | |
|----------------------|---------------|
| Martha Erhard | februaro 1985 |
| Siegfried Weber (73) | 15. 11. 1985 |
| Lothar Kuhn (51) | 30. 12. 1985 |
| Elisabeth Glas | 17. 4. 1986 |
| Gustav Ludwig (91) | 3. 6. 1986 |

Ili havu eternan pacon.

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

La iom negativa evoluo de la membro-nombro daŭris de 463 individuaj membroj en 1985 al 455 en 1986. Al IFEF ni pagis en 1986 por entute 708 individuaj kaj korporativaj membroj. Sekve ni disponigis 4 komitatojn por IFEF.

1.2 Kursoj

Por la raportperiodo estis anoncita nur unu memstara kurso, krom kunagado en 6 nefervojistaj kursoj. Tio estas la plej malkontentiga rezulto dum la tuta ekzistadodaŭro de GEFA. Ekestas la impresoj, ke ĝuste pri kursoj la anoncitaj ciferoj ne donas la realecon, precipe tiuj pri la nombro de kursanoj. Tamen ni bezonas realecajn ciferojn por povi prijuĝi la situacion. Entute kiel ĉefa tasko validas kiel ĉiam: **membrigi la kursanojn kaj prizorgi ilin.**

La telekurso, kies kasetoj pro la perakcidenta morto de L. Kuhn dum kelka tempo ne povis esti produktataj, dum la jaro suferis malfacilaĵojn. Intertempe ni sukcesis trovi novan produktanton en Herzberg, tiel ke nun denove ĉiu mendo povos esti kontentigata. Dekomence ĝis nun estas venditaj 159 ekzempleroj de la kurso.

1.3 Kunlaborantoj

La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) Esperanto (Giessner, Grass, Riehn) kunvenis dufoje kun ĉiuj komisiitoj en Lichtenfels (oktobro) kaj Fulda (marto). La komisiito por la distrikto München, Adolf Hrazdil, pro nekontiga sanstato devis retiriĝi. Transprenis la oficon kol. Klemens Lenz.

2. Kunlaboro kun IFEF

En la 38a IFEF-kongreso en Skopje (YU) partoprenis nur 26 membroj. La mal-komforta longa vojaĝo tien kaj ankaŭ timoj pro la ĝuste antaŭe okazinta reaktora katastrofo en Ĉernobil i. a. malhelpis pli multnombrian partoprenon. GEFA estis reprezentita de la komitatoj Grass, Herlitze, Riehn kaj Ritterspach. Denove por 2 jaroj estis konfirmitaj Giessner kaj

Rösemann kiel IFEF-prezidanto resp. sekretario. Kiel kutime de kelkaj jaroj ankaŭ ĉi-jare ni kontribuis al la programo „aktualaĵoj el mia lando“; faris tion Ritterspach. GEFA-prezidanto Giessner ĉefe organizis la 27an IFEF-skisemajnon en Sils (CH) kaj partoprenis en la hungara jarkunveno en Budapeŝt kaj en la 3a pola fervojista jarkunveno, por tie denove helpi en la preparoj de la 39a IFEF-kongreso. Giessner kaj Rösemann partoprenis en 2 estrarkunvenoj en Bremen kaj Rapham (N). Kiel kutime de jaroj la redaktoro de la „Terminara Kuriero“, Hartig, kelkfoje eldonis tiun internacian Bultenon, gravegan por la funkciado de la laboro en la Terminara Komisiono.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 29an jarkunvenon de GEFA en Lichtenfels de la 4a ĝis 6a de oktobro 1985 partoprenis 112 personoj, inter ili 7 gastoj el 3 eksteraj landoj. Aro da membroj partoprenis en jarkunvenoj de aliaj landoj, en la skisemajno Sils kaj en la UK Pekino. Ne necesas emfazi, ke multnombraj personaj kontaktoj estis flegitaj inter nia membraro kaj homoj en la tuta mondo.

4. Informado, varbado

4.1 Bulteno

„BULTENO“ aperis kvinfoje (5/85 ĝis 4/86), el ili kvar pagitaj de BSW, la lasta kiel eldonaĵo de GEFA, kun entute 38 paĝoj (8 fotoj). Ĉiam denove rimarkeblas, kiel necesa estas la organo, por ĝustatempe informi la membraron pri okazintaĵoj kaj okazontaĵoj de la fervojista movado. Jen bedaŭrinde kelkfoje kaj spite al niaj klopodoj okazis, ke la presejo ne priatentis la limdatojn kaj tiel malfruigis la liveradon de „BULTENO“ al la membroj.

4.2 Gazetraro

Entute ni konstatis 75 publikigaĵojn en gazetoj, revuoj fakaj kaj sindikataj kaj en oficialaj informiloj de DB. Tre taŭgas por informoj al neesperantistaj fervojistoj la flavaj paĝoj en la „BSW-Mitteilungen“, 9 ekspozicioj kun kelkmiloj da vizitantoj informis pri nia agado.

4.3 Varbado

Estis distribuitaj pli ol 2500 varbiloj kaj 375 broŝuretoj. Krome estas elpendigitaj 170 afiŝoj. GEFA presigis novan afiŝon kun moderna ICE-trajno, kiu apud 3 koncizaj sloganoj disponas sufiĉe da spaco por doni specialajn informojn. Tiu afiŝo tre taŭgas por grupoj, ĉefe por pendigi ĝin en deĵorejoj.

4.4 Propagando

Ĉar la jarlibro de UEA por 1986 ankoraŭ ne estas en niaj manoj, ne eblas komentarii ĝin rilate al reklamoj.

En la DB-prospekto „Inter Rail“ daŭre estas menciata la pasporta servo de TEJO.

5. Emerituloj

La 6an de septembro okazis la emeritula renkontiĝo en Nürnberg, organizita kaj gvidita de E. Kruse. Denove montriĝis, ke tiu aranĝo estas tre ŝatata de niaj maljunaj membroj. Eĉ el Berlin venis vizitantoj. Partoprenis entute 46 personoj.

6. Perspektivo

Pasintjare ni finis: „Neniam ni rajtos laciĝi.“ Tio klare estas kaj restos la plej realeca slogano, kiu direktu nian agadon sur la sojlo de la centa jaro de nia lingvo Esperanto. Gvidu nin tiu slogano en la duan jarcenton de ĝia ekzistado!

kompilis Giessner

● Weitere Informationen

über den IFEF-Kongreß und Visa usw. in der nächsten Ausgabe des „BULTENO“.

Seniorentreffen in Nürnberg

Am 6. September 1986 war es wieder einmal soweit. Zahlreiche Senioren aus dem Bundesgebiet waren der Einladung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk zu einem Treffen im Gebäude des Verkehrsmuseums Nürnberg gefolgt. Frau Kruse (Frankfurt), die dankenswerter Weise erneut die Ausrichtung der Veranstaltung übernommen hatte, begrüßte die Erschienenen herzlich, besonders einige über 80jährige, aber auch die neu hinzugekommenen Pensionäre und Rentner. Aus dem Kreis der froh gelaunten Teilnehmer gab es Schilderungen über die diesjährigen Esperanto-Kongresse in Jugoslawien (IFEF) und China (UEA) sowie heitere Geschichten. Nach dem gemeinsamen Mittagessen brach eine Gruppe zu einem Rundgang durch die Altstadt von Nürnberg auf. Andere besuchten das Verkehrsmuseum. Bei Kaffee und Torte war man sich einig: Im nächsten Jahr sind wir wieder dabei.

W.B.

Achtung! Billige Leerkassetten, Tonbänder

Aus dem Nachlaß unseres im Dezember 85 verunglückten Mitglieds Lothar Kuhn können wir folgende Sachen abgeben:

Leerkassetten, Agfa Chrom Cr II PE 627 einschl. Gehäuse

- Laufdauer 90 Min. je 2,95 DM
vorrätig 100 Stück
- Laufdauer 50 Min. je 2,10 DM
vorrätig 100 Stück
- Laufdauer 30 Min. je 1,65 DM
vorrätig 80 Stück

Tonbänder (teilweise bespielt, neuwertig)

- Technics XA High Resolution Recording Tape RT-60 XALC 12,- DM
- Technics XD Extra Dynamic Range Recording Tape, RT-60 XDLC, 2 Stück je 12,- DM
- Sony Dual Layer Recording Tape, LC-90 FeCr 263 m, Type II 2 Stück je 18,- DM
- Maxwell 35-180 B Sound Recording Tape, Hi-Output, Low Distortion Polyester Base (1.0mil) 35 micron, 1100 m, Metal Reel, 192 min-both direktion at 19 cm/s 35,- DM

Wir sind auch mit Abgabe an Interessenten außerhalb von GEFA einverstanden.

Bestellungen bitte schriftlich an Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 3420 Herzberg am Harz. Lieferung wird vereinbart.

GEFA

Aus den Bezirken und Gruppen

Hannover

Bremen

Merkredon, la 27an de aŭgusto la grupo findiskutis „Ankoraŭ ne ĉio estas en ordo!“

La 17an de septembro okazis agrabla kunveno en gaja rondo sub la temo: Ferio – la plej agrabla tempo de la jaro.

La 8an de oktobro oni ludis ŝakon kaj aliajn ludojn esperantlingve.

Auch die Soltauer Gruppe ist aktiv.

Nachdem bei der Jahresversammlung in Duisburg nur Gruppen als aktiv bezeichnet wurden, die Berichte an den Redakteur senden, muß sich auch die Gruppe Soltau melden.

Schon jahrelang beteiligt sich die Esperantogruppe Soltau beim Stadtfest mit einem Werbematerial. Auch 1986 waren

wir dabei. Wir zeigten Lehrtafeln nach dem Lehrbuch „Wir lernen Esperanto“, Prospekte und Zeitungen in Esperanto, die bisher erschienenen Esperanto-Briefmarken, sogar die neueste Esperanto-Ganzsache aus China mit allen drei Esperantostempeln und ungebraucht. Außerdem lagen Teile der Esperantoliteratur aus.

Um die Kosten etwas auszugleichen, wurden 100 verschiedene Briefmarken aus der Korrespondenz und frankierte Umschläge zum Kauf angeboten.

Von der Gruppe wurde ein Preisausschreiben angeboten. Hier war eine kleine Übersetzung erforderlich. Leider wurden von den ausgegebenen 250 Ausschreibungen nur 13 zurückgegeben. Von diesen haben nur drei den kurzen Text vollständig richtig übersetzt. Bei den folgenden Gewinnern handelt es sich teilweise nur um Flüchtigkeitsfehler. 5 der Gewinner zeigten Interesse für Esperanto. Vielleicht können wir diese für einen Kursus gewinnen.

Frankfurt/Main

Durch Rationalisierungsmaßnahmen (Einsparung von Bewachungspersonal) der Verwaltung steht uns leider für die Clubabende das Zimmer 117 im Bundesbahn-Sozialamt nicht mehr zur Verfügung.

Nach landwierigen Verhandlungen ist es nun gelungen, den **Konferenzraum Nord in Frankfurt Hauptbahnhof** (Aufgang zur BSW-Kantine, etwa in der Mitte der Bahnsteigquerhalle, gegenüber Gleis 18/19, I. Stock) für unsere Zusammenkünfte zu bekommen.

Esperanto-Gruppe im EG-Parlament wächst

Die Esperanto-Gruppe des Europäischen Parlaments konnte ihre Mitgliederzahlen erhöhen. Die bisher schon größte Gruppe, die Briten (!) zählen jetzt 19 Abgeordnete. Zenn gehören der Labour-Party an, neun den Konservativen. Der Gruppe gehören auch drei deutsche Abgeordnete an. Esperanto Informationsdienst 5.9.86

Pasporta Servo –

ein Reisekatalog für junge Leute

Auf Initiative von Mitgliedern der BSW-Esperantogruppe Frankfurt ist im Inter-Rail-Prospekt 86 ein Hinweis auf den Pasporta Servo enthalten.

Mit über 700 Adressen aus 53 Ländern bietet der Pasporta Servo für 1986/87 wiederum ein reichhaltiges Angebot für junge Leute, die mit Esperanto durch die Welt reisen wollen.

Esperanto in Kursbüchern

Acht europäische Eisenbahnen, nämlich die Bahnen von Bulgarien, Dänemark, Italien, Norwegen, Polen, Tschechoslowakei, Ungarn und Jugoslawien verwenden mittlerweile Esperanto in Kursbüchern, als Kursbuchschlüssel, für Hinweise zur Benutzung und für weitere Erläuterungen.

Esperanto an deutschen Universitäten

Die mit etwa drei Millionen Sprechern bisher erfolgreichste Plansprache Esperanto findet zunehmend Eingang in den Lehrbetrieb und in Forschungsprogramme deutscher Universitäten. In fünf Hochschulen der Bundesrepublik werden im laufenden Semester Sprachkurse oder linguistische Lehrveranstaltungen angeboten. Darüber hinaus bestehen an mehreren Universitäten Arbeitsgruppen, die sich mit Esperanto beschäftigen.

(aus: Esperanto-Informations-Dienst 3/86)

Nürnberg Coburg

Die Gründung des Kreises der Esperantofreunde fand im Oktober 1979 nach einem Anfängerlehrgang in Esperanto der VHS statt. Die Leitung hatte bis kurz vor seinem Tod der damalige Oberbürgermeister Dr. Wolfgang Stamberger. Nach seinem Ableben übernahm Hans Müller, Lichtenfels, die Gruppe und führte mehrere Lehrgänge durch.

Das Coburger Tageblatt berichtete am 25. 8. 1986 ausführlich mit einem Bild über die angestrebte einheitliche Völkerverständigung und stellt die Frage: Wird Esperanto einmal sämtliche Fremdsprachen ersetzen?

Regensburg

Nach einer Pressekonferenz am 24.10.86 veranlaßt vom Bba Nürnberg, Vitus Röder, berichtet die Regensburger Stadt-Umschau wenige Tage später unter der Überschrift: „Esperanto gegen europäisches Sprachchaos“ ausführlich über die Entwicklung, Bedeutung und Verbreitung der Internationalen Sprache und stellt die Frage: (Esperanto) ein neutrales, leicht erlernbares, gut klingendes und in allen Fällen brauchbares Verständigungsmittel?

Im Rundfunk „Neue Welle Regensburg“ wird demnächst über die Pressekonferenz berichtet.

Wir gratulieren unserem Freund Röder zu diesem Erfolg und hoffen, daß das Interesse zum Erlernen der Internationalen Sprache in Regensburg zu Erfolgen führt.

Meritita distingo

Dum bankedo okaze de la jarkunveno de la Franca Fervojista Esperantista Asocio (FFEA) en Paris (26. — 28. 9. 1986) s-ino Elfriede Kruse, iama estrarano en la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), ricevis de la landa asocio de FISAIC apartan medalon por honoro ŝiajn meritojn. Kortuŝe s-ino Kruse dankis kaj promesis plue agadi por Esperanto laŭ siaj povoj.

La najbaro kun la ruĝa Fiat

Antaŭ nelonge mi estis invitita al strاتفesto. Ĝi okazis en kolonio, konsistanta el kelkaj turdomegoj, en kiuj loĝas grandparte fervojistoj. Brila sabato-posttagmazo en aŭgusto favoris la aranĝon.

Juna virino, profesie laboranta, kun 2 infanoj havis la ideon.

La izolado ne plaĉis al ŝi. La anonimaj salutoj en la lifto, se ili entute okazis, jam dum longa tempo nervozigis ŝin. Ofico, dommastrumado kaj la infanoj tuttempe okupis ŝin. Do, ne temis pri propraj kontaktoj. La solajn virinojn kaj la seniorojn ŝi bedaŭris, kiuj ne volis aŭ ne trovis kontaktojn, kiuj eĉ ne uzis iun ajn okazon por foja babilado, kiuj nur grumblis pri la bruantaj infanoj, nesciante, ke ankaŭ la infanoj ne estis kontentaj. Iliaj salutoj ne estis responditaj aŭ ne perceptitaj, kelkfoje eĉ ofertita helpo ne estis akceptita. Tion oni devus ŝanĝi!

Fervoraj cirkonstancoj helpis — kaj do la stratofesto fariĝis realeco. La domposedanto konludis. Li donis la necesan permeson, prizorgis la konsenton de polica oficejo, por ke la aŭtomobiloj povis parki aliloke. Tiel liberigis spaco por infanludoj kaj loko por kradorsti. La enloĝantoj estis rondletere informitaj kaj petataj kunporti seĝojn kaj ion por manĝi. La infanoj estis entuziasmigataj! Kun multe da fantazio kaj fervoro ili ornamis la grandan korton, balancis tablojn kaj seĝojn. Kaj rigardu: — la enloĝantoj venis! Reteneme unue, parte skeptike.

Kelkaj oni devis severe persvadi. Aliaj tamen ne venis.

Komence oni ne sciis, kio do fariĝus fine. Sed ne daŭris longe ĝis kafo kaj kukoj vekis la vivospiritojn. Senlace libervolaj gehelpantoj aktivis. Juna virino okupis la infanojn per diversaj ludoj. La patroj, stimilitaj aŭ infektitaj de la ĝojo, kunagis. Subite estis muziko, kradrostiloj aperis, la virinoj pliproksimigis tablojn unu al la alia. Mi iris de tablo al tablo. La evoluo interesis min. Pri kio oni babilis?

Kompreneble la kulima vetero, infanoj, laboro, modo, butikumado **ktp.** Kiam mi petis la nomon de virino, kiu ĵus dividis gajnaĵojn al la venkontoj, oni konsternite alrigardis min. La nomon? Ne, ĝin oni ne sciis, sed . . . " ŝi posedas bluan VW". Kaj la viro, kiu faras la muzikon? . . . „lia arĝentkolora Opel Kadet staras apud la dekstra enirejo.“

Pli poste juna viro portis rostitajn kolbasojn al nia tablo. Mia najbarino klerigis la edzon: „Li estas la afabla viro, kiu jam ofte portis miajn varojn al la lifto. Kelkfoje mi vidas lin en uniformo. Li estas fervoja policisto kaj veturigas ruĝan Fiat-on.“ Tio do estas la realeco! La nomo ne ludas rolon, nur la aŭtomobilo gravas!

La festo sukcesis! La iniciatorino rikoltis laŭdon kaj aplaŭdon. Oni interkonsentis, venontjare la eksperimenton ripeti.

Ni esperu, ke minimume en tiu ĉi loĝkomplekso la anonimeco trovu sian finon.

Elka

El la fervoja mondo

Norvegio: Nova konekslinio de Fauske al Narvik

La Norvegaj Ŝtatfervojo (NSB) planas plilongigon de la sudnorda ĉeflinio ek de la nuna finstacio Fauske ĝis Narvik (ĉ. 216 km) kaj de tie pluan linio al Tromsø (ĉ. 260 km) kun branĉlinio de Bjervik al Harstad sur la insulo Hinnøy. Geologoj kaj fervojaj teknikistoj jam esploris la projekton kaj opinias ĝin efektivegebla. La unua relvoĵparto

Fauske — Narvik plej grandparte devos konduki tra tuneloj, la linio konstruata de Narvik al Tromsø devos transiri aron da montoj kaj fjordoj; la branĉlinio de Bjervik al Harstad necesigos la konstruon de granda ponto inter la kontinento kaj la insulo Hinnøy. La konstrudaŭro oni taksas je 10 jaroj.

Grekio:

Grekio:

Elektra trakcio ĝis la jugoslavia landlimo Post decido pri modernigo kaj elektrizado de la linio Ateno — Tesaloniko oni nun ankaŭ volas modernigi la certan linio-parton ĝis la jugoslavia landlimo. Por realigi tiun planon la greka registaro direktis petojn pri prezkonkuraj ofertoj al la eŭropa 50-herca grupo, al la sveda kaj brita industrioj kaj ankaŭ al japana konsorcio. Kun la modernigo de sia ĉeflinio ankaŭ la trafikaj rilatoj inter la nova EK-membro Grekio kaj okcidenta Eŭropo estos plibonigitaj. Bu

Hindio: Unua subtera fervojo por Kalkuto

En Kalkuto estas konstruata la unua subtera fervojo en Hindio. Unue 16 km longa linio kondukos de Dum Dum al Tollygunj kaj priservas 17 staciojn. Por majstri la trafik-kiomon oni mendis jam nun 114 vagonojn ĉe la Hindaj Fervojoj. Du trajnoj konsistantaj el po ok vagonoj estos unue enservigotaj kiel prototipoj sur 1,5 km longa provsekcio inter Dum Dum kaj Belgachla. La trajnoj sur la nova subtera linio trafikos komence en duminuta sinsekvo, poste la trajnfrekvenco estos plialtigata al 90 sekundoj. La maksimuma rapideco de la trajnoj estos 80 km/h. Ĉiu vagonaro povos transporti 300 personojn. Bu

Münster/Westf.:

Die Esperanto-Vereinigung Münster e. V. trifft sich jeden Donnerstag um 19.00 Uhr im BSW-Kulturraum des Hbf Münster (Gleis 21).

Redaktfino por n-ro 1/87 estas la 15. 1. 87

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck / presado: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz